



Boletín

Nº 440 Oktobro - Decembro 2022



Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 440

Redakto-skipto
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.
Revizio: J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es
angelarquillos@gmail.com

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: financoj@esperanto.es

Aliaj aferoj (escepte de financaj):
admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3^o, 7
ES-28015 Madrid
admin@esperanto.es
Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961
TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926
4025
Poŝtelefono: +34 638 547 104
Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata respondilo)

Estraro

Prezidanto: Ángel Arquillos López
Vicprezidanto: Alberto Granados Orcero
Sekretario: Manuel Parra
Vicsekretario: Isidoro Ortega López
Kasisto: Jesús M. García Iturrioz
Voĉdonantoj: Vicente Manzano (Viko)
“ Ana Manero

Prezidanto HEJS
kaj voĉdonanto: Guaroa Emmanuel González.

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400

SALUTVORTOJ

Karaj legantoj,

Antaŭ ĉio mi deziras al vi ĉiuj, Feliĉan
Novjaron 2023.

Malgraŭ la terura milito kaj la novaj
variantoj de la Kovim-19 kaj en Ĉinio
kaj Usono, ni restas optimismaj kaj
“ne tre timemaj”, ĉar niaj kongresoj
kaj renkontiĝoj sukcese disvolviĝas en
la tuta mondo kaj en la urbo Seviljo oni
laboras por okazigi nian hispanan ok-
tobran eventon al kiu ni devos aliĝi tuj
kiam en la venonta bulteno oni publi-
kigos ampleksan informon pri la pro-
gramo.

En ĉi tiu numero ni scios iomete pri la
sukcesa kongreso okazinta en Afriko,
kun ĉeesto de du hispanoj kaj aliaj
eŭropanoj, kiuj kutime partoprenas
niajn internaciajn eventojn.

Ne mankas artikoloj pri amuzaĵo kaj
pri diversaj grupoj, kiuj ĝuis kaj tostis
je la memoro de Zamenhof.

Kaj denove mi petegas vian kontri-
buon, ĉar mi scias ke multaj legantoj
povas riĉigi la enhavon de nia bulteno
pri personaj spertoj kun Esperanto,
pensoj, spritaĵoj. ktp.

Ángel Arquillos
Redaktoro

ENHAVO

Salutvortoj	1
Fundación Esperanto	3
Letero al geesperantistoj	4
Centra oficejo de UEA	5
Hispannacia Kongreso de Esperanto 2023	8
La pilkoj de la monda futbala ĉampioneco...	9
Kongresumi senegale 8a Afrika Kongreso	10
Lerneja Scienca Kalendaro 2023 en Esperanto	14
Pri grupoj kaj Asocioj	15
La oficiala altitudo en hispanaj stacidomoj	22
Novajo pri la deponleĝo	24
Artikolo pri Esperanto en blogoj de Hispana kaj Eŝropeana	25
Mikro-rakontoj	26
La libro nia plej bona amiko	27
La Stranga Angulo, ĉapitro 7a	28
Porpaca agado en Unuiĝintaj Nacioj	30
Iom da matematiko, (9) La biciklo	31

NOTO

En la pasinta numero, pro teknikaj problemoj ne aperas la lasta verso de la poemo Romanco pri la enamiĝinto kaj la morto **“que la hora ya está cumplida / venis jam la hor’destina”**.

Alia eraro temas pri la artikolo *“Sevilo, ĉefurbo de HEF en 2023”*. La aŭtoro estas Andy Hernández kaj ne Andy García.

Senkulpigon.

FUNDACIÓN ESPERANTO

INFORMADO PRI 2022

La helpoj programitaj por 2022 estis anoncataj kaj publikigataj en n-ro 436 de "Boletín" (okt-dec.2021, p. 3) de HEF.

Ni decidis destini helpojn al la tri grupoj kiuj prezentis peton. Jen ili:

FRATECO (Esperanta Societo en Zaragozo): 800 €, Pro eksterordinaraj krompagoj de Komunumo de Proprietuloj kie estas la sidejo.

E- Grupo de Bilbao: 100 €. Pro organizado de kursoj.

E-Valencia Asocio: 100 €. Pro agado en proejkto BitArkivo pri skanado de dokumentoj.

Krome, denove en nia sidejo en Zaragoza estis organizitaj E-kursoj.

PROJEKTOJ POR 2023

Helpoj por instruado kaj disvastigado de Esperanto.

Oni helpas diversajn aktivaĵojn por Esperanto.

Ekz.: organizado de E-kursoj, eldono de libroj en aŭ pri Esperanto, realigo de E-eventoj...

Eĉ oni povas fari aliajn sugestojn aŭ proponojn.

La petoj devos esti ricevataj antaŭ ol la 30a de novembro de 2023.

Kutime, ni helpas prefere al E-grupoj kaj pro aktivaĵoj jam faritaj.

Principe, la tuta kvanto disponebla por helpoj estos 300 €.

Lorenzo Noguero
(Prezidanto de "Fundación Esperanto")



Fundación Esperanto

LETERO AL GEESPERANTISTOJ

La ĝisnuna peranto de UEA en Hispanio, Pedro Garrote, komunikis al HEF ke li ne plu daŭrigos tiun taskon. Ni publikigas lian adiaŭan mesaĝon. La nova peranto estas José María Rodríguez Hernández, el Kordovo, kiun vi povas kontakti retpoŝte per: ueaperanto@esperanto.ac, aŭ poŝte ĉe: Apartado de Correos 3142, ES-14080 Córdoba (Hispanio)

Ĉi-tiu letero ne estas adiaŭo, sed nur flankeniĝo.

Mi kontaktis kun la esperanta movado en Madrido en la Liceo de MEL.

Tuj kiam mi kapablis helpi, mi tion faris, eĉ kiam mi ne estis sufiĉe bone preparita por plenumi la aferon kiun mi entreprenis, ĉefe la instruadon, konsiderante ke mi laboris en banko, mi ne estis instruisto, kaj miaj konoj de gramatiko estis la bazaj.

Mi helpis al MEL en la librotenado, kun komputilo kiun mi havis en mia hejmo.

Post ne multe mi partoprenis en la estraro de HEF, dum 11/12 jaroj kiel kasisto. La laboro estis granda, ĉar la librotenado ne estis komputiligita, HEF havis multajn kontojn en malsamaj bankoj, du kasojn kaj du librovendejojn, kaj en Madrido kaj en Valladolido. Krome HEF faris la laboron de peranto de UEA. En la unuaj tagoj mi frenezigiĝis, ĉar neniu avertis min pri tio, kaj la aliaj estraranoj havis siajn problemetojn. Feliĉe ke la laboro por MEL instruis min solvi la problemojn de la librotenado, kaj la kontrolon de la libroj venditaj kaj vendotaj, de HEF.

Pro peto de Manolo Parra, mi fariĝis peranto de UEA, Tio helpis multe al la librotenado, ĉar la mono venis rekte en mian konton, kaj ne tuŝis la kontojn de la federacio. Do, la kontoj estas pli klaraj kaj kompreneblaj.

Mi ĉeestis kelkajn U.K., kaj en du el ili, Israelo kaj Danlando mi salutis nome de HEF.

Mi estis membro de la grupo de Melanoj kiuj tradukis la libron “El hombre que desafió a Babel”

Sed la tempo pasas, mi estas iomete laca kaj mi pensas ke estas la momento lasi la laboron al alia persono. La laboro estas malgranda kaj facila, ĉar UEA kaj aliaj asocioj permesas pagi siajn kotizojn per multaj malsamaj manieroj, ĝiro banka, Visa, Pay-pal, per konto en la propra asocio, ktp. Do malpli kaj malpli da abonantoj uzas la peranton. Tio ne signifas ke ĝi ne estas taŭga, tute ne, ĉiam estos personoj kiuj bezonos helpon por pagi kongreson, pagi aĉeton de libroj, ktp, kaj peranto helpema kaj preparita povas fari tion sen problema, laborante en sia hejmo.

Krom tio mi estas iomete deprimita. Kelkaj el vi, eble ne ĉiuj, scias ke mi havas Parkinson; kaj de antaŭ kelkaj monatoj mi glutas pilolojn (Sinemet plus) kiu permesas al mi antaŭeniri pli malpli.

Spite tion, mi pensas ke ni revidiĝos, iam ie, en kongreso kiun mi kuraĝos ĉeesti.

Ĝis, amikoj.

Pedro A. Garrote

CENTRA OFICEJO DE U.E.A

Ĉu ebla solvo en la “senpopoligita Hispanio”?

Post kelkvara luado, en la jaro 1961 Universala Esperanto-Asocio finfine aĉetis domon en la nederlanda urbo Roterdamo. Temis pri konstruaĵo sur la strato Nieuwe Binnenweg, ĝuste ĉe la numero 176. Depost tio, kaj dum multaj jaroj, tiu domo estis la centra referenco de la Esperanto-movado. Tamen pasintjare, pro ekonomiaj malfacilaĵoj, la UEA-estraro decidis vendi ĝin. *Kio okazos poste? Kie troviĝos la centra sidejo de la movado?* Jen aferoj ankoraŭ ne solvitaj



Strato Nieuwe Binnenweg 176 en
Roterdamo (Nederlando)

Pro la fakto, ke eblaj solvoj estas proponitaj, inter ili aĉetado de pli modesta domo en tiu sama nederlanda urbo; kunlaborado kun ĉeĥa entrepreno; translokigo de la centra sidejo en alian landon ktp, mi pensas, ke ĉiuj membroj de UEA rajtas proponi eblajn solvojn, kondiĉe ke ili estos realigeblaj. Do, jen plia propono.

Unue, *kiun landon elekti por tiu ebla nova sidejo?* Ĉar Nederlando estis taŭga lando dum tiom da jaroj, agnoskite ke la sidejo devus troviĝi en lando kiel eble plej simila al Nederlando kaj se eble, ĝuanta pliajn avantaĝojn. Tio estas, ĝi devus esti demokratia, libera, membro de internaciaj organizoj, kun malfermitaj landlimoj kaj se eble kun monunuo facile ŝanĝebla en aliaj Ŝtatoj. Ĉi ĉiuj estas karakterizaĵoj de Ŝtatoj membroj de Eŭropa Unio (libera kaj demokratia), de la areo de la *Schengen*-zono (malfermitaj landlimoj) kaj kun eŭro kiel oficiala monunuo, ĉi tio faciligas la pagon de kotizoj, aĉetadon de libroj ktp, el kiu ajn alia lando en la mondo.

Hispanio estas membro de Eŭropa Unio, ĝi apartenas al *Schengen*-zono kaj eŭro estas nia oficiala monunujo. Do, nia lando havas similajn karakterizaĵojn ol Nederlando, tamen plia afero estas favora al Hispanio rilate Nederlandon kaj aliajn membro-Ŝtatojn de la Eŭropa Unio, ĉi tie vivo-kostoj estas pli malaltaj. Jen ili:

Kostoj pri manĝado: 22% pli altaj en Nederlando ol en Hispanio.

loĝado: 62% pli altaj en Nederlando.

transporto: 65% pli altaj en Nederlando.

kulturaj aferoj: 39% pli altaj en Nederlando.

Averaĝe vivo-kostoj en Nederlando estas 48% pli altaj ol en Hispanio. Tiel, oni povas aserti, ke Nederlando kaj Hispanio estas demokratiaj socioj, ĝuantaj samajn rajtojn kaj liberojn, tamen Hispanio havas vivo-kostojn duone pli malaltaj ol Nederlando kaj tio sendube estas grava afero, se oni parolas pri aĉetado de nemoveblaĵo, pago de salajroj, servo-kostoj ktp.

Dua pripensebla afero estus, *kiun urbon aŭ regionon oni povus elekti en Hispanio?* Estas necese diri, ke gravaj urboj kiel Madrido, Barcelono, Valencio, Seviljo, Bilbao havas (suferas?) vivo-kostojn tiel altaj kiel tiuj de centra Eŭropo, almenaŭ rilate aĉetadon de nemoveblaĵoj. Do, la plej taŭga loko por aĉeti sufiĉe grandan sidejon por internacia organizo devus troviĝi fore de tiuj grandaj urboj kaj ankaŭ malproksime de marbordo, ĉar tiuj zonoj ankaŭ estas multekostaj.

Lastatempe, amas-komunikiloj kaj politikistoj parolas pri la *“senpopoligita Hispanio”*. Temas pri tiuj teritorioj, kiuj fine de la 20-a jarcento kaj ankaŭ dum la 21-a, ties enloĝantaro malpliĝis en sufiĉe granda kvanto. Tiuj areoj perdis ne nur enloĝantojn, sed ankaŭ infrastrukturon kaj servojn. Pro tio, en tiuj areoj kosto de nemoveblaĵoj kaj ĝenerale ĉiuj vivo-kostoj grandkvante malpliĝis. Jen statistiko pri ĉi tiu afero:

Kosto de konstruita m² en novembro 2022 laŭ komunumoj kun altaj kaj malaltaj prezoj:

Madrido: 3373 € Kastilio-Leono: 1446 €

Baleara Ins. 3240 Ekstremaduro: 1244

Basklando: 2922 Murcio: 1202

Katalunio: 2654 Kastilio-Manĉo: 1157

Kaj en tiuj provincoj de la *“senpopoligita Hispanio”* kiel Teruelo, Reĝurbo, Zamoro, Palencio ktp, estas eble trovi nemoveblaĵojn kies kosto estas eĉ malpli ol 500 €/m². Tiel, aĉeti konstruaĵon en hispanaj provincoj kiel Palencio, Zamoro, Sorio, Teruelo, Badaĥozo, ĉe vilaĝoj kun malpli ol 1000 enloĝantoj, eĉ certe multe malpli grandaj, povus kosti inter 30.000 kaj 80.000 €. Ofte temas pri 2-etaĝaj konstruaĵoj, preskaŭ deko da ĉambroj kaj sufiĉe ampleksa korto. Ni devas scii, ke UEA buĝetis pli grandan monkvanton por la pretigo de nova ret-situo.

Jen kelkaj ekzemploj pri malmultekostaj konstruaĵoj en Hispanio.



Domo en vilaĝo je 1 horo de Madrido kun 100 enloĝantoj. Du-etaĝa konstruaĵo plus supra mansardo. Ĝi havas 7 ĉambrojn kaj 3 banĉambrojn. Entute 350 m² kaj korto. Prezo: 65.000 €



Domo en vilaĝo je 2 horoj de Madrido kun 1000 enloĝantoj. Du-etaĝa konstruaĵo, ĝi havas 5 ĉambrojn. Entute 400 m² kaj korto. Prezo: 60.000 €

Temas nur pri du ekzemploj, el tiuj centoj da nemoveblaĵoj aĉeteblaj en la *“senpopoligita Hispanio”*.

Kompreneble, ĉi tiu propono havas kontraŭflankon. Tiel, se la centra oficejo de UEA troviĝus ĉe malgranda vilaĝo en senpopoligita regiono, la eblaj laboristoj kaj volontuloj en tiu oficejo loĝus en zono kun malmultaj servoj, ekz. sen kinejoj aŭ teatroj, kun tre simplaj provizejoj ktp. Tamen, ĉiuj ili ne estas ege malproksimaj de Madrido, proksimume inter 200 kaj 300 kmoj.

Do, jen propono. Multaj el la legantoj opinios, ke temas pri revema projekto, tamen for nia movado jam ekzistas entreprenoj kaj ne-registaraj organizoj kiuj decidis translokigi sian sidejon en malgrandajn vilaĝojn de Hispanio, kie kostoj estas multe malpli grandaj. UEA bezonas novan sidejon kaj samtempe la Ŝparon de siaj malgrandaj monrimedoj, do, aĉeto de konstruaĵo en malgranda vilaĝo ĉe la *“senpopoligita Hispanio”* povus esti solvo al tiuj aferoj.

José María Rodríguez Hernández

HISPANA NACIA KONGRESO DE ESPERANTO 2023

Kiel konate, la Hispana Nacia Kongreso de Esperato por la jaro 2023, konsentite en la lasta Nacia Kongreso en Comillas, Kantabrio, okazos en la urbo Sevilo de la 12-a ĝis la 15-a de oktobro 2023.

Tiuj kiuj havis iam la okazon organizi similan eventon, scias kiom malfacila estas tiu tasko. Tial, de la momento kiam estis scigita la urbo por ĉi tiu jaro, kreiĝis la LKK kaj komenciĝis la laboro.

La komenca intenco estis impliki la lokan urbestron en ĉi tiu evento, petante kunlaboron en kiel eble plej multaj aferoj. Ĉirilate, kelkaj klopodoj estis faritaj urĝe de la LKK, sed ĝis nun neniu respondo esti ricevita, tial sen ĉesi insisti sed ne halti, oni decidis komenci aliajn paralelajn kaj sendependajn klopodojn.

Estas la intenco de la Organiza Komitato tuj aperigi la Kongresan Retejon kun la ĝis nun ekzistanta informo kaj la aliĝilo kun la firma devontigo doni plian enhavon en tiaj datas.

Kiel interesa fakto, ni povas komenti, ke oni havas la kunlaboron de la Universitato de Sevilo per la intereso kaj engaĝiĝo de kelkaj profesoroj de koncerna universitato, kio tutcerte, donos al la kongreso specialan intereson.

Ni ankaŭ havas la kunlaboron de HEF kaj AEU en diversaj aferoj, kio faciligas nian laboron konsiderinde.

De septembro ĝis nun jam okazis pluraj kunsidoj de la LKK por ekkomenci doni formon kaj enhavon al la Kongreso, kvankam estas ankoraŭ nenio definitiva.

Estas la deziro de la LKK akiri interesan programaron kiu eksciti la eblajn ĉeestantojn.

Sevilo estas belega kaj bonveniga urbo kiu atendas la alvenon de ĝiuj esperantistoj, ne nur hispanaj sed ankaŭ de aliaj lokoj, por ĝui kune kelkajn agrablajn kaj neforgeseblajn esperanto-tagojn.

Ĝis baldaŭ,
José Roldán
Prezidanto LKK

LA PILKOJ DE LA MONDA FUTBALA ĈAMPIONECO EN ESPERANTO

Grandega surprizo: Esperanto estas unu el la ses lingvoj aperantaj en Al Rihla, la oficiala pilko de la Monda Ĉampioneco de Futbalo 2022. La vortoj aperantaj estas: "futbalo estas pasio – respekto – teamlaboro – honesteco – kolektiva – respondeco".

La lingvo aperas ankaŭ en la dua pilko, kiun oni utiligas por la duonfinaloj kaj finalo, nomata Al-Hilm, kun aliaj vortoj: "KUNE", "PASIO", "INSPIRO", "FIERECO" kaj "TRADICIOJ".

Vi povas vidi ambaŭ en la apudaj bildoj, kaj ankaŭ en la retejo de ADIDAS, kie eblas ankaŭ akiri ilin



KONGRESUMI SENEGALE LA OKA AFRIKA KONGRESO EN SENEGALO 26 – 30.12. 2022



La rezulto estis kontentiga, kvankam de tempo al tempo la malakurateco de la gekongresanoj kaj programoj okazis. Indas menciigi kelkajn stelajn elstarulojn, kiuj plivigligis la Kongreson, nome: Francesco Maurelli, Assane Faye Jérémie Sabiyumva, Lafi Charles, Viatčeslav Ivanov, Martina Sačs, Espoir Kassati, Rakoen Maertens, Patriko Manirakiza Aimé inter la aliaj.

La kongreso estis impresege senlima universo. Estis por ni belegaj tagoj en tre agrabla etoso kun afablaj, amindaj, gastemaj kaj kuraĝemaj esperantistoj. Entute ĝi estis sperto, kiun ni ĉiuj ege aprezas, tre vigliga al la Esperantujo en nia Kontinento, precipe al la organizantoj de la 8-a AK kaj al ĉiuj elstaraj esperantistoj ĉeestaj, kiel Mireille Grosjean el Svislando, Francesco M. el Germanio, Jérémie S. el Burundo, sen forgesi la esperantistajn motorojn de Senegalo kiel Lafi Charles Diatta kaj Assane Faye.

Estas notinde ke diversaj programoj kaj ĝuindaj aktivecoj estis en la kerno de la kongresprogramaro. En Tieso, urbo kie okazis la Kongreso, en la nuna tempo kun evoluanta materiala civilizacio, aŭtoj kaj ĉevaloj anstataŭas la piediradon. Okazis tamen longtempaj aŭto-veturadoj kaj ŝtopiĝoj survoje, kio kompreneble malhelpis kelkajn frumatenaĵajn programerojn.

Multaj prelegoj estis projekciitaj de la prelegantoj, kaj ĉeestis diversaj esperantistoj ĉu komencantoj, ĉu progresantoj, eĉ lingvkapabluloj, kiuj partoprenis en diversaj prelegoj laŭ indikitaj salonoj. La prelegoj de Mireille Grosjean {pri triangula komerco kaj kiel paroli en bona maniero kun najbaroj}, de Andreas Emmeriĉ el Germanio, de Rakoen Martens el Britio {rilate misinformojn, malinformojn, malfidojn, miskomprenojn, dispolusigon kaj verecajn efikojn} kaptis la intereson de ĉiuj kongresanojn. La frazo, kiun ni ĉiuj ege atentis estas tiu, en kiu Rakoen ilustrkadre skribis, ke Francesco Maurelli planas kandidatiĝi kiel Prezidanto de UEA. La prelego de Andreas Emmeriĉ estis kaj kortuŝa kaj interesege.



François Lo Jacomo el Francio, Viatĉeslav Ivanov el Rusio, Kassati Espoir estis intereseuloj kaj allogis ĉiujn ĉeestintajn, ĉu esperantistoj aŭ ne. Interpretistoj provis traduki la prelegojn al la neesperantistoj. La neesperantistoj pro-tra kaj per tiuj prelegoj petis niajn vatsapnumerojn, rezulte nun mi persone havas kvar gelernantojn, kiuj lernas Esperanton vatsapkoresponde .

Impresoj: kio impresis min unue, estas ke Senegalano estas gastema lando kiu ne pagigas vizojn por enirintojn. Tio ege ŝparis al ni la monujeton. Duc, % 99 de la senegalanoj estas islamanoj, sed dum Kristnasko, ĉiuj kunfestis tiun Julan tagon kune! Okazis futbalmatĉo de esperantistoj kontraŭ junuloj en urbo Tieso, sed bedaŭrinde la golisto nia estis de alia teamo, do ĉiu povas imagi la rezulton. La E-teamo estis turene venkita, kvar kontraŭ nulo.

Estis du loĝejoj: unu nomata Senĝor gastigis ĉiujn esperantistojn el urboj Dakaro kaj Rufisko. Tostana Centro gastigis ĉiujn ekstersenegalajn esperantistojn. La kongresa urbo estis Tieso kaj Tostano Centro estis la Kongresejo kun ĉirkaŭ 60 partoprenintoj.

La kongresa temo estis : “ Esperanto, ŝanco kaj ne minaco por Afriko”.

Donacoj: la Afrika Komisiono donacis librojn al kelkaj aktivaj instruistoj kaj al la landaj asocioj. François Lo Jacomo el Francio donacis futbalon kaj librojn. S-ino Petra Severiano donacis vestaĵojn al nia Orfejo kaj kelkajn materialojn donacis Andreas Emmeric al nia Orfejo. Esperanto-flago, pendaĵoj por produkti kolĉenon aŭ orelingojn donacis s-ino Martina Saĉs- Bockelmann el Germanio. Krome, s-ino Daniela Power el Usono donacis poŝtelefonon al nia preĝejo.



Martina el Germanio, donacis al s-ro Mana verdan plaststelaĵon kiel premio pro la laboro kiun li faras helpante senpage georfojn kaj gemaljunulojn.



Ekskurso:

En la lastaj tagoj de la Kongreso, ni ekskursis en la insulo nomata GORE. Ni vizitis sklavejan domon kun priskribo: “ IRO SEN REVENO”, kio signifas, ke oni neniam evitus morton se oni estus kondukita al tiu vojo, La insulon ĉirkaŭas la Atlantika Oceano kaj la sklavejo konsistas el subteraj lokoj kaj fositaj truoj putoj. Dumetra dometo loĝigis maksimume 200 sklavojn! En la insulo, bravuloj kiel Jérémie S., Koffitê, Patriko kaj Mana varbis neesperantistojn al Esperanto. Estis abundega manĝaĵo relative malmultkosta, kun frititaj fiŝoj kaj suko farita el baobabarbo kaj ĝingibro. Ni vizitis popularataĵojn kaj diversajn manfaritaĵojn.

Antaŭdankojn: rekte iru al jenaj geamikoj:

(Povas esti, ke mi menciu aŭ ne la nomon pro propra kialo.)

0. Ĉefe al Francesco Maurelli kaj Sara, ili scias kion ili senhezite faris por mi
1. Jérémie Sabiyumva, neanstataueblulo kaj kuraĝema ano de UEA.
2. Kara amiko el Luksemburgio
3. Ĉiuj Munkenanoj
4. Mia finna amikarino
5. Andreas Emmeriĉ
6. Martina el Germanio
7. Daniela Power
8. Espoir Kassati
9. Viatĉeslav Ivanov
10. S-ino Touré, la estrino de la Tostana Centro
11. Al miaj tri gefiloj nome Espero Mana, Arjeta Mana kaj Matti Mana, kiuj preĝis por mi kiam mi vojaĝis kaj lasis ilin dum du semajnoj. Fine al Lydia Binja, kiu bonkore zorgis pri la georfoj kaj farenaĵoj. Ĉio estas en ordo malgraŭ mia foresto.

Koran dankon al ĉiuj senescepte!

Mana Namutema Brinson

LERNEJA SCIENCA KALENDARO 2023 EN ESPERANTO

La Lerneja Scienca Kalendaro 2023, eldonita de la Supera Konsilio por Scienca Esplorado de Hispanio (CSIC), ĉijare denove havas version en Esperanto, post la sukcesa eldonado en 2022.

La kalendaro enhavas kolekton de eventoj aŭ datrevenoj ligitaj al scienco (en ampleksa senco) por ĉiu tago de la jaro, kun speciala atento al la diverseco de la ĉefroluloj.

Vi povas ĝin trovi, elŝuti kaj printi en pluraj aranĝoj el: <https://digital.csic.es/handle/10261/285166>

Kiel en pasinta jaro, la kalendaron akompanas Didaktika Gvidilo, por ke instruistoj povu ĝin utiligi en lernejoj, kaj ankaŭ versio en facila lingvo por utiligo fare de pli maljunaj lernantoj aŭ homoj kun malfacilaĵoj por legado.

Krom en Esperanto, la kalendaro ekzistas en versioj en la hispana, galega, astura, kataluna, aragona, eŭska, angla, franca, portugala, araba, kaj ĉijare unuafoje ankaŭ en la persa (farsia) lingvoj.

Pri la tradukado zorgis teamo kunordigita de Hispana Esperanto-Federacio.

Mencio al Esperanto kaj agnosko al la kunlaboro de HEF aperas en la oficiala prezento fare de la CSIC, kiu okazis la 11an de januaro, kaj ankaŭ en ties gazetara komunikilo.

Krome, la kalendaro en Esperanto havas propran tŭiteran konton, kiu ĉiutage publikigas la koncernajn datrevenojn. Vi povas ĝin sekvi en: <https://twitter.com/SciKalendaro>.



PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

Fuenlabrado

KONKURSO PRI DEBATO EN FUENLABRADO

La delegitaro por la sudo de Madrida regiono de la Universitato UNED, kune kun kelkaj urbestroj de tiu regiono (Leganés, Fuenlabrada, Parla, Pinto kaj Alcorcón) organizas konkurson pri debato en lernejoj ("liga de debate escolar"). Okazos unue municipa fazo, dum januaro, februaro kaj marto, kun fina intermunicipa konkurso en aprilo kaj majo. Ĉiu urbo elektas propran temon, kaj la temo en Fuenlabrado de tiu unua fazo estos... Esperanto!, konkrete, la ebla rolo de Esperanto en eŭropuniaj institucioj ("La UE tiene 24 lenguas oficiales; ¿debería ser el esperanto el número 25?").

Dum la debato estos du teamoj; hazarde unu devos apogi Esperanton kiel helplingvon en Eŭropo kaj la alia kontraŭos. La partoprenontoj devos informiĝi pri la temo, serĉi argumentojn por la debato, disvolvi kritikan alrigardon.

Ni trovis jam intereson ĉe la koncernaj mezlernejoj, kaj dum venontaj semajnoj eblos diskonigi informojn pri nia lingvo rekte ĉe junuloj.

Ekzemple, laŭ peto de la instruisto respondeca, nia juna samideano Jorge Brasal vizitis la 19an de decembro la lernejon "Colegio Público de Educación Infantil, Primaria y Secundaria Salvador Dalí" en tiu urbo. Oni pretigis renkontiĝon unue en eta biblioteko kaj poste en klasĉambro ene de la mezlernejo kun 10 lernantoj plus 2 instruistoj. En la komenco Jorge parolis pri Esperanto kaj ĝiaj lingvistikaj kuriozaĵoj, kaj poste ili aliris pli specifajn aferojn de la debato. Evidentiĝis ke la kunordiganto bone konis la temon, kaj la surprizo estas ke li estis antaŭe skribinta al oficialaj servoj de la Eŭropa Unio kun la tre konkreta demando: "¿Se podría incluir el esperanto dentro de las lenguas que tiene la Unión Europea?". Ili akurate ricevis oficialan respondon, ne tute favoran, sed ankaŭ ne komplete malfavoran al ebla rolo de Esperanto.

La debato komenciĝos la 27-an de januaro, kaj estas antaŭvidita antaŭa nova renkonto kun la lernejo, por plu pretigi la temon.

En la konkurso entute partoprenos 40 mezlernejoj, kaj do estas unu el la plej gravaj tiaj iniciatoj tutlande.

Kantabrio



La Kantabra Esperanto Asocio festis la Tagon de Esperanta Libro (Zamenhoftagon) la 17an de decembro en restoracio de la ĉefurbo. Ĉeestis 20 homoj. Oni parolis pri la ĉijara Hispana Kongreso okazinta en Comillas kaj pri la estonta HEK okazonta en la urbo Sevilo, kaj UK, okazonta en Torino (Italio)

Adúriz

Bilbao



La 17an de decembro, membroj de la grupo de Bilbo festis la Zamenhof-Tagon. Jesús Miguel García Itgurrioz prelegis pri “La malpli konata Zamenhof cionismo kaj homaranismo” Susana Zabaco, profesia kantistino, majstre ludis pianon, kantis kaj instigis la aliajn kanti, kaj fine okazis la komuna manĝo ĉe la salono de la asocia sidejo. Kiel kutime, la manĝaĵoj kaj trinkaĵoj estis alportitaj de la ĉeestantoj.

Zaragoza

En 2022, denove okazis ĉestaj renkontiĝoj kaj celebroy.



Iel, la celebroy de Tago de E-Libro okazis surprize pro la ricevo de antikvaj E-libroj de iama esperantisto (Félix Martín Triep. Pri li legeblas en la reto)

"Frateco" kiel tradicie proponis kunesti en zamenhofa bankedo, organizita de nia sekretario.

La tagmanĝo okazis en frateca etoso kaj partoprenis 15 fratecanoj kaj simpatiantoj.

Teruelo

La Zamenhof.-Tago de Liberanimo aperis en la ĵurnalo de Teruelo. La Festo disvolviĝis en tre bona etoso.



La asociación de esperantistas de Teruel celebró el 'Zamenhof-tago'

La asociación de esperantistas turolenses Liberanimo celebró el pasado lunes, con una cena de hermandad y su asamblea anual, el *Zamenhof-tago*, o Día de Zamenhof, la fiesta internacional que celebra el movimiento esperantista de todo el mundo, y que oficialmente tuvo lugar ayer, 15 de diciembre. Zamenhof fue un oftalmólogo polaco, doce veces nominado al Nobel de la Paz, inventor del esperanto a finales del XIX.

Ĵurnalo de Teruelo

Valencio



Post pluraj jaroj de pandemiaj limigoj, la Valencia Esperanto-Grupo forte rekreskis dum la jaro 2022. Laŭ kelkaj membroj de Valencio, estis la plej aktiva, en-urba aktivado de post la Universala Kongreso en la jaro 1993.

Internaciaj retaj kursoj, pli ol 50 lecionoj pri la libro Don Kihoto kaj pri la fama Bildvortaro de Esperanto; ĉiusemajnajj Kafo-Kunvenoj en pli ol 25 trinkejoj en kaj ekster Valencia urbo. Kaj fine de la jaro, rekomenciĝo de monataj kunvenoj kun prelegoj.

Aldoniĝas al tio, la unika, ĉi-jara esperanta projekto de Cheste, en kiu ĉiuj stratoj priskribiĝas en kvar lingvoj, inkluzive Esperanton. Ĉe la stacidomo de Cheste nun oficiale aperas BONVENON esperantlingve.

Kaj por la Zamenhofa Festo ĉi jare ĉeestis 17 Esperantistoj, nombro kiu duobliĝis kompare kun lastjare. Klaras, ke la Grupo de Valencio forte re-kreskas post la pandemio.

Nur restas restarigi viglan ĉeestan instruadon, sed tio eble estos temo por la venonta fojo. Bonan Novjaron kaj Sukceson al ĉiuj urbaj grupoj en Hispanio!



Dennis Keefe



Madrido



Kiel estas tradicie, la 15an de decembro la esperantistoj en la tuta mondo festis la Zamenhofan Tagon aŭ Tagon de la Libro kaj la Kulturo en Esperanto.

En Madrido la ĉefa celebrado de la Zamenhof Tago okazis, en Fuenlabrado, en la sidejo pri kiu disponas Fuenlabrada Esperanto-Ligo, la sabaton 10an de decembro. Ĉeestintoj aŭskultis bildigitan prelegon de Pedro Hernández pri la malkovro de la tomo de faraono Tutanĥamon en Egiptio.

Sekve, post “demando-mapo” kiel enkonduko de Ricardo Biurrun, oni starigis viglan debaton pri “Kia neŭtraleco en esperantaj kluboj aŭ societoj fronte la milito”. Oni kunmanĝis la frandaĵojn portitajn de la partoprenantoj mem, kaj poste oni dolĉajumis babilante pri ĉio kaj nenio.

Partoprenis dekduo da homoj.

Don Benito



Ankaŭ en Ekstremaduro, nome en Don Benito, por la Zamenhofa Tago kunsidis okopo da esperantistoj de la tuta regiono. Jen foto dum la tagmanĝo en japana restoracio (serĉe de internaciismo)..

Kani

Oŭrenso



Ankaŭ en Oŭrenso (Galegio) oni festis la Zamenhof-Tagon. Tri samideanoj kunvenis en kafejo por babili kaj tosti je la sano de Esperanto. Temis pri tre modesta renkonto, sed ĝi estis la unua eble en la historio, do ni fidase ke por venontaj jaroj la festo plu kreskos.

Toño

Malago

La 29a de decembro, kiel kutime, kelkaj membroj de AEU en Malago, kunsidis ĉe la Kafejo Esperanto de la urbo kun la celo babiladi en la internacia lingvo por praktikado kaj ĉi-foje kun ĉesto de nia kara samideano Jose Antonio el Kosta Riko, kiu studas en la Universitato de Sevilo kaj mi konatiĝis kun li antaŭ kelkaj jaroj, danke al la reto.

Kafo, biero, teo kaj la tipaj "churros" ne mankis sur la tablo. Inter ni ankaŭ ĉestis Jaime, juna samideano el Kolombio, loĝanta en Malago, kiu kutime partoprenas nian



ĵaŭdan kunvenon. Kompreneble ni profitis la okazon tosti je la memoro de la kreinto, ĉar ni ne povis celebri la Zamenhof-Feston siatempe. Neniam estas tro malfrue por festi tian gravan tagon kaj la monato decembro estas la plej grava en la jaro: Kristnasko, Jarfino, Zamenhof datreveno, ktp.

A. Arquillos

Vélez Málaga

Okaze de la Zamenhofa Tago en la mezlernejo IES Almenara kie 30 junaj studentoj lernas Esperanton festis la finon de ilia unua lernotrimestro. Ili alportis diversajn manĝaĵojn kaj aŭskultis Esperantan muzikon.



Ili ankaŭ profitis la okazaĵon por dekori la tutan mezlernejon kun Esperantaj bildoj en diversaj lingvoj kaj tiel diskonigi la lingvon al la tuta studentaro de la mezlernejo. Ilia celo estas ke Esperanto forte enradikiĝu kiel kerna parto de la historio kaj identeco de la mezlernejo Almenara de Vélez-Málaga, la unua publika mezlernejo el Hispanio kie oni oficiale povas lerni Esperanton.



LA OFICIALA ALTITUDO EN LA HISPANAJ STACIDOMOJ

Sur pasinta numero de nia revuo, oni parolis pri la definitiva kunordigo de la hispanaj hor-zonoj dank'al instalado de horloĝoj en ĉiuj stacidomoj. Tamen, tiu informo pri oficiala horo ne estis la sola aranĝo kiu okazis en Hispanio pro la starigo de fervojaj linioj. Ja, alia tabuleto aperas klare videbla en ĉiuj hispanaj stacidomoj, temas pri la indiko pri la oficiala alt-nivelo de la stacidomoj, do, de la vilaĝo kie ĝi troviĝas.



Unue, estas necese koni kio estas la alteco super la nivelo de la maro aŭ simple la altitudo. La signifo de ĉi tiu vorto jam estas dirita, temas pri la alto de punkto super la meza marnivelo. La marnivelo estas la nivelo de la mara surfaco, tiu mezuro estas uzata por esprimi la altecon de geografiaj punktoj, ekzemple la alteco de montoj. La marnivelo ne estas konstanta, ĝi ŝanĝiĝas ĉefe laŭ tajdocikloj, ankaŭ pro vento kaj temperaturo. Pro tio, ĉiu lando uzas konvencian averaĝan marnivelon. Ekzemple, en Francio oni uzas averaĝan marnivelon de la urbo Marsejlo por difini la altitudon de ĉiuj geografiaj punktoj en tiu lando; en Britio oni uzas la averaĝan marnivelon mezuritan en la urbo Newlyn en Kornvalo. Kaj en Hispanio?

En Hispanio la Geografia Instituto, kreita en la jaro 1870 kaj depost 1873 Geografia kaj Statistika Instituto, decidis kalkuli la altitudon ekde la marnivelo en la urbo Alakanto, apud la mediteranea maro. Sciencistoj elektis ĉi tiun levantenan urbon pro la fakto, ke temis pri la haveno kie la alto de la basa tajdo kaj tiu de la alta estis plej proksimaj. Tiel, inter la jaroj 1870 kaj 1874, oni mezuris tie la marnivelon 4-foje en la tago. Post tiom da kalkuloj, oni eltrovis, ke la averaĝa marnivelo estis je la sama altitudo ol la unua Ŝtupo de la Ŝtuparo de la alakanta Urbodomo, temas pri la konata kiel "Ŝtuparo de la Reĝino" honore al Elizabeto la 2-a. Nuntempe tabulo memorigas ĉi tiun fakton en la konstruaĵo.



Ĉe la urbodomo de Alakanto tabulo sur la unua ŝtupo montras la bazon de la oficiala altitudo en Hispanio.

Difinita la bazan punkton, fervojaj inĝenieroj ekuzis tajdografon en la fervoja linio inter Alakanto kaj Madrido, tajdografo estas ilo kies celo estas mezuri la altecon de punkto rilate marnivelon. Tiel, oni kalkulis, ke Madrido troviĝas je 625,562 metroj super la marnivelo en Alakanto. Poste, tabulojn montrantaj tiun mezuron oni instalas en ĉiuj hispanaj stacidomoj kaj eĉ en aliaj gravaj oficialaj lokoj. Sed atentu, la altitudo estas mezurata ne rilate la plankon de la stacidomo, sed je la linio kiu troviĝas dekstren kaj maldekstren de la mezuro, tiel:



Kompreneble la instalado de ĉi tiuj tabuloj ne estis simpla tasko, la unuan tabulon oni instalas en la jaro 1871 kaj la lastan en 1966. Tiel, kvankam multaj el la hispanaj stacidomoj renoviĝis dum la lastaj jaroj, ekz. la stacidomo Atocha en Madrido aŭ Santa Justa en Seviljo, la novaj stacidomoj ĉiam montras fiere tiujn antikvajn metalajn tabulojn, kiuj havas kiel bazon belan ŝtuparon en Alakanto.



Hispana Amikaro de Fervojistoj Esperantistaj
<https://hafe-19.websself.net>

NOVAĴOJ PRI LA DEPONLEĜO

Pasintan majon oni aprobis modifon de la *Deponleĝo* (*Ley de Depósito Legal*) kaj ĝi validas ekde la 2an de januaro 2023. Inter la ĉefaj novaĵoj troviĝas la inkludo en la leĝon de la devo liveri ankaŭ la antaŭajn bitajn dosierojn uzatajn por la presado de libroj kaj gazetoj.

De tiam, la Nacia Biblioteko de Hispanio (*Biblioteca Nacional de España, BNE*), en kunlaboro kun la centroj pri konservado de la aŭtonomaj komunumoj, disvolvadis retan spacon por deponi ĉi bitajn dosierojn. La eldonantoj povas jam registriĝi en la retejo Laŭleĝa Depono. Antaŭpresaj bitaj dosieroj (*Depósito Legal. Archivos digitales previos a la impresión*) por realigi la deponon.

En la kazo de eldonantoj de la Madrida Komunumo, ili devos realigi la deponon en la retejo disvolvita de tiu komunumo: Laŭleĝa Depono de publikaĵoj (*Depósito Legal de publicaciones*). Klakante en la sekcio Livero de publikaĵoj (*Entregas de publicaciones*), oni aliras la paĝojn kun la bezonataj instrukcioj por deponado.


BNE kaj la Madrida Komunumo kunordiĝos por la sendado al BNE de la dosieroj deponitaj en tiu komunumo, tiel ke la madridaj eldonantoj ne estu devigataj fari la deponon en du malsamaj lokoj.

Oni klopodis, ke la depono estu kiel eble plej simpla kaj la sola kondiĉo estas nomi la dosierojn per la deponnumero, la ISBN aŭ la ISSN. Kaj, kvankam oni permesas ĉiujn formatojn, BNE konsilas la formaton PDF.

La deponitaj eldonaĵoj estos alireblaj en BNE kaj en la respektivaj centroj pri konservado de la aŭtonomaj komunumoj per sistemo de sekura aliro: Konsultejoj de la Hispana Reta Arkivo (*Puntos de consulta del Archivo de la Web Española*)

Por ajnaj duboj aŭ sugestoj eblas kontakti la deponleĝan departementon de BNE per jena retadreso: depositolegal@bne.es

Ana Manero



ARTIKOLO PRI ESPERANTO EN LA BLOGOJ DE HISPANA KAJ EUROPEANA

Antaŭ kelkajn semajnojn, la responsuloj de la Ministerio pri Kulturo, kiuj respondecas pri Hispana (<http://hispana.mcu.es>), kontaktis min, kiel responsulon de Bitoteko, por peti artikolon pri Esperanto publikigota en la blogoj de Hispana kaj Europeana.

Hispana estas la oficiala kolektanto de bitaj objektoj en la lando kaj pere de ĝi la rikordoj de Bitoteko (<http://bitoteko.esperanto.es>) aperas ankaŭ en la datenbankoj de Hispana kaj Europeana (<https://www.europeana.eu>)

Jen ĉerpaĵo de la ricevita mesaĝo:

“Ĉe Hispana ni laboras ĉiutage por doni maksimuman videblecon al viaj rikordoj kaj por atingi tion ni pensas, ke la plej bona maniero estas uzi Europeana-n kiel montrofenestron de viaj kolektoj.

Pere de la eldonsekcio de Europeana eblas proksimigi vian kulturan heredaĵon al la tuta mondo diversmaniere.

Laŭ tiu ideo, estus tre interese publikigi blogeron pri Esperanto kaj, ĉar via kolekto kunigas, organizas, konservas kaj diskonigas dokumentojn en aŭ pri Esperanto, ni ŝatus kalkuli je via kunlaboro.”

HispanaPRO

Recursos para la transformación digital de archivos, bibliotecas y museos.



[Inicio](#) [Sobre nosotros](#) [Hispana](#) [Europeana](#) [Eventos](#) [Blog](#) [Documentación](#) [FAQs](#) [🔍](#)



Los inicios del esperanto

Kompreneble, mi akceptis la proponon, verkis teksteton laŭ la postulataj kondiĉoj kaj elektis bildojn el Bitoteko jam publikigitaj en Europeana por ilustrati ĝin. La teksto estas redaktita surbaze de informoj publikigitaj en la retejoj de Toño del Barrio (<http://www.delbarrio.eu>), HEF (<https://www.esperanto.es>) kaj Vikipedio (<https://eo.wikipedia.org>) kaj ĝin tradukis en la anglan Alejandro Pareja. Kelkaj el la uzitaj bildoj troviĝas en Bitoteko danke al la kunlaboro kun aliaj esperantaj institucioj, kiel la iama Esperanto-Fondaĵo Cesar Vanbiervliet.

Riceviĝis apartaj gratuloj de la responsuloj de Europeana, kaj laŭ la vortoj de nia kontakto ĉe la Ministerio, “*ili tiom entuziasmiĝis, ke oni petis la hispanlingvan version por publikigi ankaŭ ĝin*”.

Kaj ĉar la Z-tago estis jam proksima, ambaŭ institucioj akceptis nian proponon publikigi la tekston ĝuste la 15an de decembro. Bela omaĝo al nia lingvo flanke de oficialaj instancoj!

Tru la artikolon en Hispana-Pro (<https://hispanapro.mecd.es/blog/>), hispane, kaj en la blogo de Europeana, hispane (<https://www.europeana.eu/es/blog/how-esperanto-started-and-developed>) kaj angle (<https://www.europeana.eu/en/blog/how-esperanto-started-and-developed>)

Ana Manero

MIKRO-RAKONTOJ

La fina venko

Mi restadis ekstere de ĉio dum jaroj. Mi restis tute izolita, en la kamparo. Kaj tiam, iun tagon, revenis mi en la urbon. Videblas verdaj steloj, ie kaj tie... Jen nekonata homo diras al mi “saluton” en la zamenhofa. Kio, do, okazis dum mi foresto...? Ĉu la fina venko? Diable...!!

La sonorilo

Mateniĝas, mi milde vekiĝas. Leviĝinte, mi la domon traserĉas. Ŝi ne plu estas tie, ho ve! Kaj tiam... la porda sonorilo aŭskultebblas!

Juan García

LA LIBRO, NIA PLEJ BONA AMIKO

La 15-an de decembro 2022 estis por ni feliĉa tago, ĉar festante la Zamenhofan Tagon kaj samtempe la tagon de la Libro, la libroj de nia familia esperanta biblioteko atingis sian lastan celon: La IES Almenara de la urbo Vélez Málaga (Málaga).

La esperanta agado de mia edzo Luis kaj mia, estis kerno en nia vivo ekde nia juneco. Ni laboris por esperanto, ni multe vojaĝis kaj konis mondon pere de Esperanto, partoprenante en preskaŭ ĉiuj Unversalaj Kongresoj ekde 1978, UK en Varna (Bulgario) ĝis 2016 en Nitra (Slovakio), kaj nia esperanta biblioteko pleniĝis iom post iom de aĉetitaj libroj dum la naciaj kaj internaciaj eventoj. Luis estis dum multaj jaroj Libroservanto de HEF kaj bone konas la esperantan literaturon, kaj ni ĝuis legante esperantajn librojn.

Sed la jaroj pasis kaj nun, jam nejunaj, ni decidis ke nia biblioteko devis iri al nova grupo aŭ institucio kie oni bezonus librojn. Mi demandis al niaj amikoj Angel Arquillos kaj Manolo Parra, kaj ili sendis al ni tri adresojn por demandi se ili dezirus librojn. La respondo venis tuj de Vélez Málaga kaj amiko Fabián Jiménez klarigis al mi sian bonegan kaj fruktedonan laboron en tiu Mezlernejo kie oni oficiale povas lerni Esperanton kaj li havas pli ol tridek lernantojn.

Elekti la librojn (ĉiujn ekcepte tiujn al ni dediĉitaj de la aŭtoroj), enpaki, serĉi transportagentejon, kaj fine sendi ilin. Kaj jen jam en la Mezlernejo.

Ĉar la temo de la libroj estas tre varia, kaj kelkaj estas grandaj sed aliaj malgrandaj kaj facile legeblaj por junuloj, ni deziras ke legante ilin kaj post la lernado de la lingvo, tiuj junuloj povos ĝui same ol ni la veran internacian etoson. Tiun etoson ni spertis ĉiam, dum niaj renkontiĝoj kaj kongresoj, veran amikecon inter personoj diversaj, kun diversa kulturo, kutimoj kaj opinioj, sed ĉiam en unueco danke al nia kara lingvo Esperanto.

La libroj devas havi rolon en nia vivo, ĉu verkante, ĉu legante ilin, ĉar lia enhavo povas esti tre malsimila, portante nin al la plej variaj mondoj kaj situacioj, kaj krome, helpante nin en la lernado kaj perfektigado de niaj konoj de fremdaj lingvoj, inter ili Esperanto.

Kvankam ni jam scias ke la plej bona amiko por la gejunuloj estas la plej moderna poŝtelefono, ni konsilas legi ankaŭ librojn kaj eble ili ĝuos la legadon kaj la libro konvertiĝos en lia plej bona amiko.

M. Rafaela Uruña

LA STRANGA ANGULO Ĉapitro 7a

Matematika instruo: Kiel sindamaĝi sinsavante

Multaj homoj, kiuj ne scipovas legi kaj skribi, tamen kapablas rekoni numerojn kaj fari kalkulojn. Kompreneble ne temas pri cerbo sed edukado. Ne ĉiuj havas la realan aliron al la edukada sistemo. Do la plejmulto de la homaro komprenas, ke se oni sumas plurnombrajn pozitivajn numerojn, la rezulto ankaŭ estas pozitiva.

Aŭ ne...

Estas matematika defio, kiu delonge allogas min: realigi stultan grupon pere de inteligentaj membroj. Ĝi matematike defias, ĉar oni rimarkas, ke la sumo de pluraj inteligentaj mensoj (inteligento > 0) atingas nulan rezulton (sumo = 0). Logike tio ne eblas. Tamen la realo ne mensogas: tio okazas eĉ ofte. Post pluraj sensukcesaj klopodoj trovi klarigon, mi subite renkontis la respondon esplorante pri temo, kiu ŝajnis ne esti en rilato kun la matematika defio sen kun la socia psikologio aŭ la politiko: la subpremado. Lasu min enkonduki la aferon per rakonteto.

Sube de impona monto la naturo starigis belegan lokon, kie pluraj familioj decidis restadi kaj konstrui ion, kiu fine iĝis kampara urbeto. La impona monto sinsekve produktis akvon, neĝo kaj glaciaĵon. Tamen preskaŭ nenio el tio damaĝis la urbeton danke al natura muro de arboj kaj tero, kiu bremsis ĉion antaŭ ol trafi la domojn. Malgraŭ la sukceso de tiu naturaĵo, kelkfoje tro da pluvo produktis riveron da koto, kiu minacis ĉiujn kaj ege malofte trapasis la muron kaj alvenis ĝis la unuaj domoj. Iam iu familio, kies domo proksimis al tiu naturaĵo, decidis demeti iom el la muro kaj konstrui sian propran defendon, alportante teron kaj tranĉante arbojn. Dum la sekvanta granda pluvo, klare rimarkeblis la fakto, ke iom pli da akvo kaj koto eniris en la urbeton, sed nenio tuŝis la domon de tiu familio, ĉar la muro de ili konstruita tute sukcese kondukis. Do rapide pluraj aliaj familioj same reagis, alportante materialojn de la granda natura muro ĝis la ĉirkaŭo de siaj domoj, konstruante sian privatan mureton. Pli kaj pli, la pluvo estis danĝera por ĉiuj; por ĉiuj krom tiuj unuaj familioj, kiuj havis sian propran defendon. Baldaŭ la domoj situitaj en la supra parto el la urbeto havis sian propran defendon, tiel ke la riveretoj de koto aŭ akvo komencis esti grava minaco por la sekvanta linio de domoj. Tiel ili ankaŭ same kondukis. Ju pli da familioj tion decidis, des pli malforta iĝis la natura bremsilo, des pli granda iĝis la rivero kaj des malpli utilaj estis la privataj muroj. Venis la tago, kiam la pluvo estis tiom abunda, ke larĝa kaj potenĉava maro da koto trafis la urbeton sen renkonti ion, kiu kapablis bremsi ĝin. La tuta loko rezulte estis balaita. La koto kovris ĉiujn domojn. La travivantoj forlasis la iaman urbeton por ĉiam, plendante pri la kapriĉoj de la naturo.

Tiu imagita sperto utilas al mi por la celo klarigi pri unu el la konsekvencoj de la subpremado: la individuoj forkuras de ĝi agante tiel, ke ju pli da homoj forkuras, pli da forto atingas la maljusta procezo, tiel ke fine la tuta komunumo suferas pro la sumo de

Multaj homoj suferas bitan subpremadon. Ĝi konsistas en la procezo pro kiu pli da flankoj el la vivo nepre bezonas la uzon de bitaj rimedoj, kiel Interreto aŭ poŝtelefonoj. La scipovo pri tia kreskigo de la teknologia dependeco ne estas sur ĉies manoj. Oni povintus protekti la homojn, kiuj estis sukcese konduktantaj ĝis tiam. Tia homo regis sian vivon, rendezuis kun aliaj, aranĝis aferojn en la administrado, movis monon en sia bankokonto, vizitis kuracistojn ktp. Sed la subita mondo igis ilin handikapuloj. Antaŭ iliaj okuloj la mondo rapide ŝanĝiĝis malaperante la ebloj aranĝi la vivon sen poŝtelefono. La aliaj uloj reagis klopodante adaptiĝi individue, tiel ke rapidege la plejmulto el la homoj eĉ preferis bite aranĝi ĉion. Do la administradoj kaj entreprenoj malfortigis, kaŝis eĉ malaperigis la ĝistiamajn kutimajn alirojn. Oni povintus iri pli malrapide, aŭ protekti tian homon aŭ restigi plurajn rimedojn. Tamen la reago estis unue forlasi ilin, due trakti ilin kiel kulpulojn de sia situacio kaj trie klopodi alporti ilin al la nova mondo.

La mondo de la lingvoj estas kerne alloga por esperantistoj. Tie la fortigo de la maljusteco pere de la individuaj forkuroj estas speciale forta kaj sukcesa. En la monda nivelo, familioj de neangloparolantaj landoj dungas zorgantojn de la infanoj per la kondiĉo, ke ili nur parolu angle. Praktike la infanoj ne obeas, ĉar ili ne komprenas la stultan klopodon de la gepatroj kaj preferas komuniki bone. En ĉiu loko, la plej bona rimedo komuniki inter homoj estas la loka lingvo. Plenkreskuloj forgesis tion, sed infanoj ne. Homoj elektas turismi en angloparolantaj landoj, amindumi kun angloparolantaj eblaj estontaj paroj, spekti angloparolantajn filmojn, fakiĝi pri angloparolantaj kulturoj... Tia konduto ege sukcese fortigas la por ĉiuj premon regi la anglan lingvon. En Ameriko okazas rilate al la hegemonio de la hispana aŭ la portugala. En Afriko okazas rilate al la hegemonio ĉefe de la franca. Pluraj gepatroj decidas ne plu uzi sian animan lingvon kaj "savi" siajn gefilojn klopodante, ke ili nur scipovu la hegemonian. Oni facile povas kompreni tian klopodon. Tamen ĝi atingas ke la rivero da koto iĝas pli granda, forĵetante pli da uloj de la eblo vivi dignan vivon.

Jes. Por mi ĉiam estis mirinda matematika defio tio, pri kiu granda kvanto da inteligentaj homoj, kiuj decidas sian konduton laŭ sia lerteco kaj individuaj aŭ familiaj ĉirkaŭaĵo, kunatingas komunan finan rezulton, kie ĉiuj havas pli da premo, kie la vivo malfaciliĝis, kie la malekvilibro inter homoj altiĝas, kie la fabriko de malsukcesuloj sukcesas. Oni ne konscias, ke la plejmulto el la homaro konsistas el malsukcesuloj. Estus bele se ili konscias, kunigas kaj lasas ludi la ludojn, kies regulojn ili ne decidas.

Do jen potenĉava rimedo ŝanĝi la socion pere de la stulta grupa konduto far inteligentaj individuoj: atingu videblan pozicion, ŝajnu fakulo kaj diru, ke post dek jaroj ĉiuj estos farantaj ion konkretan; kaj aŭskultinte vin, voluntula memkreskanta armeo de timemaj homoj individue reagos tiel, ke via anonco iĝos vero.

Viko

PORPACA AGADO EN UNUIĜINTAJ NACIOJ

La ĉefa kialo por la kreado de Unuiĝintaj Nacioj (UN) en 1945, post la dua mondmilito estas *“savi estontajn generaciojn de la plago de milito”...praktiki la toleremon kaj vivi en paco unu kun la aliaj, kiel bonaj najbaroj*”. Laŭ tio, la ĉefa celo de UN estas laŭ la 1-a artikolo de la Ĉarto de *“UN konservi la internaciajn pacon kaj sekurecon, kaj tiucele apliki efikajn kolektivajn rimedojn por preventi kaj forigi minacojn kontraŭ la paco kaj por subpremi ĉian agon de agreso aŭ alian rompon de la paco, kaj realigi per pacaj metodoj, konforme al la principo de justeco kaj internacia juro, la ĝustigon aŭ la solvon de internaciaj disputoj aŭ de situacioj kiuj povus konduki al rompo de la paco”*.

Kompreneble, por tiuj celoj, UN havas strukturon, ĉefe, la Ĝeneralan Asembleon, kiu nur rekomendas, kaj la Sekurecan Konsilion, kiu dum la agado de tiu Organizo, havas la ĉefan rolon helpi la finigon de multnombraj konfliktoj, ĉu kiam estis neefikaj aliaj provi-zoraj aranĝoj, ĉu per blokado, ekonomiaj punoj kaj aliaj trudaj rimedoj.

Per Rezolucio “Unio por Paco” de novembro 1950 (Res. 377V de la Ĝenerala Asembleo), tiu ĉi organo povas ankaŭ fari ĉian necesan aranĝon por la paco, kiam la Sekureca Konsilio ne prenas ilin, pro la kontraŭa vetoo de unu el la kvin konstantaj membroj. Bedaŭrinde tiu ĉi Rezolucio malmulte aplikiĝis.

Alia bona metodo por la paco estas la “Operacioj por gardi la pacon” uzitaj sukcese ekde la kreado de UN en multaj partoj de la tero. Tamen, la kialoj de konfliktoj ŝanĝiĝis laŭlonge de la jaroj, ĉar antaŭe la konfliktoj estis kutime interŝtataj, dum nuntempe abundas la civilaj konfliktoj.

Ĝis ĉi tie ni menciis la gardadon de la paco *laŭjure*. Sed kio okazas *fakte*?

Sciante estas ke ne ĉiam UN sukcesis gardi la pacon en la multnombraj konfliktoj tra la jaroj kaj tra la mondo. Ofte oni aŭdas kritiki UN pro neago aŭ pro ne sukcesi finigi militon, kaj multaj homoj pensas ke UN malmulte faras propace.

Ni havas nun bonan ekzemplon, la militon en Eŭropo pro la invado de Rusio al Ukrainio, kaj multaj homoj denove pensas ke UN ne ludas bone sian pacigan rolon. Sed la Sekureca Konsilio konsistas el dek kvin membroj, el kiuj kvin estas konstantaj membroj, dum la aliaj estas elektitaj por du jaroj. La Respubliko de Ĉinio, Francio, la Unio de Sovetaj Socialistaj Respublikoj (nun Rusio), la Unuiĝinta Regno de Granda Britio kaj Norda Irlando, kaj la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko estas la konstantaj membroj.

Do, Rusio, estante “konstanta membro” de la Sekureca Konsilio, havas vetorajton kiam oni diskutas pri tiu milito.

Jen la problemoj kiu faras ke UN, malgraŭ ĝia celo gardi la pacon, restas senpova en kelkaj cirkonstancoj.

M.R.Urueña

Iom da matematiko (9)

LA BICIKLO.



La biciklo. Granda elpensajo de la homaro. Oni povas paroli pri ĝi el diversaj vidpunktoj. Nun ni okupiĝu pri matematika flanko de tiu veturilo.


Plejprobable, en ĉies mensoj nestas bildoj pri tiuj bicikloj de la 19-a jarcento kun grandega rado antaŭe kaj alia eta malantaŭe, kiel tiu de la apuda bildo. Sufiĉe malsimila al la nunaj. Diferencoj multnombros, sed ni fiksu niajn okulojn sur iu manko: tiuj bicikloj ne portis tiun ĉenon, kiu nune kunigas la malantaŭan radon al tiu parto, kie troviĝas pedaloj.

Nuntempe, kiam oni turnigas la pedalojn per piede, tiu movo estas transmissiata, pere de kranko, al dentorado, kiu tiamaniere turniĝas kune kun la pedaloj. Sur la dentorado endentiĝas ĉeno, kiu transmissias la movadon al pli malgranda dentorado, kiu estas trapasita de la akso de la postrado de la biciklo.

Tiel, kiam oni pedalas, oni turnigas la antaŭan dentoradon, kio siavice movigas la ĉenon, kio turnigas la malantaŭan dentoradon, kio fine turnigas la postan radon de la biciklo.

Nu, ni imagu biciklanton, kiu portas 44 dentojn en la pedaldentorado kaj 11 en la malantaŭa dentorado.

Kiam li aŭ ŝi turnigas la pedalojn kompletigante plenan giron, la antaŭa dentorado "pasigas" la 44 dentojn. Tio signifas ke ankaŭ pasis 44 ĉeneroj. Kaj same en la posta rado. Sed ĉi lasta havas nur 11 dentojn. Sekve, por "pasigi" la 44 ĉenerojn, ĝi devas kompletigi 4 girojn.




Rezulte de ĉio ĉi, per unu sola pedalado oni atingas 4 girojn de la posta rado, kiu estas tiu, kiu movigas la biciklon.

Ĉar la radorando de normala biciklo mezuras pli malpli 2,10 m., en la antaŭa ekzemplo, unu sola pedalado permesas veturi $4 \times 2,1 = 8,4$ m.

Se ne estus la ĉeno, la pedaloj devus esti trapasitaj de la akso de la antaŭa rado. Sekve estus la pedaloj mem, kiuj rekte movigus la biciklon. Tiel, en la antaŭa ekzemplo, per unu pedalado, la biciklo veturus nur 2,10 m.

Granda diferenco, ĉu?

Kaj tiu estas la kialo de la grandega rado, kiun havis la prabicikloj.



Jesús M. García Iturrioz
jmgiaa@hotmail.com

